# LA SEPSTELA URBO


**Bulteno de Madrida Esperanto-Klubo**

Boletín del Club Esperantista Madrileño

Adreso: Pizarro 19 (Centro Riojano)

MADRID (HISPANUJO)

Martes y sábados de
8½ a 10 de la noche.



5ª JARKOLEKTO | Nº 41 | 30 APRILO 1959

POR CIERRE Y REFORMA
DEL CAFÉ VARELA

NUESTRAS REUNIONES MATINALES DE LOS DOMINGOS
TENDRÁN LUGAR EN EL C A F É I R U Ñ A

Desde el próximo 17 de Mayo, y con motivo del cierre del Café Varela por reforma del local, nuestras tertulias dominicales de 12 a 1.30 de la mañana se trasladarán provisionalmente al Café Iruña, Avenida de José Antonio 52 (Metro Santo Domingo o Callao). La consumición de uno de los asistentes, por sorteo, será a cargo del Club.

## XX CONGRESO ⁘ MÁLAGA

ESPAÑOL DE ESPERANTO — 18 AL 23 DE AGOSTO DE 1959

Finfine en la longa vico de kongresoj okazintaj en pluraj hispanaj urboj nia renkontiĝo ĉi-jara okazos en Málaga, unu el la plej belaj, ĉarmaj kaj allogaj urboj de Andaluzio, apud la blua Mediteraneo. La antaŭvidita programo, kun la garantio de zorga preparo fare de la prestiĝa asocio CÍRCULO MERCANTIL de Málaga, estas vere alloga kaj inda je la solena Zamenhof-Jaro nun festata en la tuta mondo.

Málaga, urbo plena je luma beleco, havas interesajn urbopanoramojn. Neforgesebla estas la vidindaĵo ekde Gibralfaro-kastelo, sur alta monteto arbokovrita apud la senlime blua maro.

Apude etendiĝas la urbo, kun ampleksaj avenuoj, parkoj, promenejoj kaj gravaj historiaj monumentoj, el kiuj elstaras la t.n. Alcazaba, araba palaco; la Katedralo kaj pluraj belegaj preĝejoj en kiuj troviĝas valoraj religiaj skulptaĵoj, plejparte verkoj de la mondfama skulptisto Pedro de Mena.

Ne nur Málaga, sed ankaŭ la proksimaj urbetoj estas turisme allogaj. Tre konata pro sia ampleksa bonega strando estas Torremolinos, je 14-kilometra distanco de Málaga; ankaŭ Marbella, Fuengirola kaj, pli malproksime de la marbordo, Ronda, urbeto kun impresaj panoramoj sur tereno geologie interesplena.

Dum la Kongreso oni faros plurajn ekskursojn por viziti ĉiujn-ĉi lokojn.

- - - - - - - - - - -

PROGRAMA PROVISIONAL DEL CONGRESO: Sesiones de trabajo.- Concierto de música española en el Conservatorio.- Misa en el Santuario de Nª Sra. de la Victoria.- Apertura en el Ayuntamiento.- Vino de honor y fiesta folklórica en la Alcazaba.- Visitas culturales.- Visita a la finca »La Concepción« (Jardín Botánico).- Excursión a Ronda.- Excursión a la Costa del Sol, hasta Marbella.- Visita a bodegas famosas.- Banquete oficial en la Hostería de Gibralfaro.- Clausura en el Ayuntamiento.-

SECRETARÍA DEL CONGRESO: CÍRCULO MERCANTIL, CALLE DE LARIOS, 3, MÁLAGA.

Rimarko de la redakcio.- Ĉar nia redaktoro, malgraŭ sia arda deziro, ne estis anstataŭata, li prokrastis la aperon de la bulteno dum unu monato pro amaso da profesia laboro. Li dankas la kunlaboron por la redaktado kaj enkliŝigo fare de S-ro. Enfedaque.-

D. Rodríguez

## ESPERANTO EN LA GAZETARO

"EL ALCÁZAR"(10-2-59), intervjuo al aŭstralia s-ano, S-ro J. MATASIN.
"DIGAME"(3-3-59), kutima rubriko "HOY LE INTERESA A USTED RECORDAR...", dediĉita al la Zamenhof-Jaro.
"PUEBLO"(2-4-59), kroniko el Málaga pri la ĉijara Hispana E-Kongreso.
"DIGAME"(14-4-59), abundaj informoj pri Esperanto, kun tri bildoj.
"ABC"(25-4-59), tutpaĝa artikolo de s-ano D. DALMAU, kun portreto de Zamenhof.
"HOJA DEL LUNES"(Madrid,28-4-59), longa artikolo de S-ro GOMEZ FIGUEROA, kun granda fotografaĵo.
"EL PUEBLO GALLEGO"(16-4-59), ilustrita kroniko pri la altmerita E-agado de s-ano ALONSO NUÑEZ.
"FARO DE VIGO"(16-4-59), same kiel la antaŭa.

---

LUMI SATOJOŜI, 23jara studentino el Tokio (Aojama Gakuin Universitato) deziras interŝanĝon kun hispana samidean(in)o pri literaturo, muziko kaj precipe pri moroj kaj pupoj de diversaj landoj. Adreso: Lumi Satoyoshi, 3-333, Hyakunin-cho, Shinjuku-ku, Tokyo-to, Japanujo.

---

KORAN DANKON! - Ni dankeme kvitancas al s-ano Teodoro ELIZONDO, el TRUCIOS, Vizcaya, la alsendon de la verko "LA JESO DE KNABINOJ", responde al nia anonco en ĉi tiu bulteno kaj al s-ano D. DALMAU, donacon po 20 pesetoj por nia Klubo kaj ekzempleron de revuo kun lia artikolo.

---

## SUKCESA E-KURSO

Regule disvolviĝas, kun konstanta ĉeestantaro, la kurso por komencantoj, kiun gvidas ĉe CENTRO SEGOVIANO s-ano Manuel MARTÍN GÓMEZ

---

## KAFEJO VARELA, BALDAŬ PEREONTA

La 15an de venonta Majo fermos siajn pordojn, laŭ niaj novaĵoj, nia E-babilejo, "CAFÉ VARELA". Multaj elegioj estos kantataj de la verkistoj kiuj kreadis en ĝi. Ni komunikas la decidon de la Estraro de MEK por anstataŭi tiun nian jam ektradician kunvenejon por festaj tagoj en la unua paĝo de ĉi tiu bulteno.

---

## SAMIDEANAJ VIZITOJ

Denove ni havis la ĝojon akcepti nian malnovan portugalan amikon, membro de nia Klubo, s-ano Florenco GASTÃO DE MOURA, kiun ni gratulas pro la naskiĝo de nova filino. S-ano GASTÃO pasigis longan tempon en Belgujo, kie trovis varman akcepton de la tiea gesamideanaro. Li multe k laŭde rakontis al ni pri tiu klera lando, sufiĉe por skribi longan kronikon, se la spaco de nia bulteneto permesus tion. S-ano GASTÃO regule partoprenis E-kunvenojn kaj amuzojn en Bruselo, Antverpeno, Bruĝo, ktp. Ankaŭ li vizitis F-inon VERMAAS, Direktorino de la C. O. de UEA en Rotterdam kaj ricevis gravan helpon de S-ro JAUMOTTE. Ĉe S-rino VERBEKEN, fervora esperantistino li ankaŭ kunvenis kun gesamideanoj. Belaj travivaĵoj, dank'al Esperanto!

Ges. JACOBS, el Nederlando, kunportis al ni la saluton de haarlemaj gesamideanoj. Dankon kaj reciprokon!

S-ano Erhard W. MATTHES, el Manheim, kun hispana paro loĝanta en Germanujo, partoprenis nian kafejan kunvenon kaj pafis foton de la grupeto.

Ankaŭ estis tre simpatia la vizito de s-ano Reinhold SIMON, juna studento ĉe Heidelberg'a Universitato, kies gepatroj iam fotografis simile nian kafejan rondanaron. Nun tiu foto taŭgis al juniora SIMON kiel originala kaj kortuŝa identkarto.

Fine, dum la lastaj tagoj,ni akceptis alian malnovan amikon, ĉiaman vojaĝanton, nome, S-ron W. L. SIMPKINS, "universala civitano" el Britujo, lando kiun li foje vizitas kiel turisto."

---